

# ESPERANTO

## ★ TRIUMFONTA ★

Publikigilo de multaj gravaj esperantistaj organizaĵoj.

Aperas semajne. — Senpagaj monataj aldonoj: „Internacia Komercio“ kaj „Revuo“ (literatura, popolscienca).

Protektantoj:

D-o Leono Zamenhof, Warszawa  
W.M. Page, advokato, Edinburgh  
Ernest Archdeacon, Paris  
J. Gili Norta, komercisto,  
Barcelona

H. Fischer, grandindustriisto,  
București  
Frans Schoofs, Antwerpen  
P. v. Medem, bank- kaj fabrik-  
direktoro, Kaunas.

**N-o 194**  
**1. 6. 1924**

Redakcio:

Cefredaktoro: Teo Jung.  
Redaktoro: Robert Kreuz.  
Redakciaj kunlaborantoj:  
H. Jung kaj M. Butin, L. K.

Administracio:

Horrem b. Köln, Germanlando

Abonprezo

po numero egalvaloro de 0,06 dolaro  
aŭ 0,20 sv. fr. por landoj, kies valuto  
sufiĉe maksimume 50%; por ceteraj landoj  
landoj 0,06 dol. aŭ 0,25 sv. fr.

Anoncpreso

po kvadrat-centimetro egalvaloro de  
0,20 sv. fr. (ĉe antaŭa pago 0,15 sv. fr.),  
en „Internacia Komercio“ la duoblo.

**Antwerpen, Barcelona, București, Edinburgh, Horrem, Kaunas, Paris, Warszawa**

**Atentinda cirkulero de l' Ministro de Internaj Aferoj de Germana Respubliko.**

**Nova sukceso kaj bonaj ŝancoj de Esperanto en radiotelefonio.**

La Esperanto-Instituto por la Germana Respubliko jam antaŭ kelka tempo ricevis informon de la Ministerio de Internaj Aferoj de la Germana Respubliko, ke ĉi tiu ministerio sendis specialan cirkuleron al la administracio de instruado de l' germanaj liberŝtatoj. Intertempe la Instituto ricevis ankaŭ la permeson, publikigi la cirkuleron. La direktoro faras tion des pli volonte, ĉar la skribaĵo vidigas, ke la registaro de la Germana Respubliko intense akceias niajn klopodojn.

Jen la traduko:

La Regna Ministro de Internaj Aferoj.  
III 2551.

Berlin, 31 marto 1924.

Al la instru-administracio de la federŝtatoj, escepte Prusujo.

Sinjoro la Prusa Ministro por Scienco, Arto kaj Popolklerigo direktis al la provincaj instru-direktoroj dekretan pri la lingvo Esperanto, kiu havos esencan signifon por la disvolvigo de tiu ĉi monda helplingvo. Li ordonis al la provincaj instru-direktoroj ĉiurilate akceli la instruadon de Esperanto. Mi transdonas en la aldono kopion de tiu ĉi grava skribaĵo, dezirante speciale atentigi al la lasta frazo de la antaŭlasta alineo, kiu laŭ mi ŝajnas taŭgi por kontraŭstari al disvastiĝinta antaŭjuĝo.

La Regna Registaro jam de ĉiam montris vivan intereson al la ideo de monda helplingvo kaj ĉiam akcelis tiun ĉi movadon laŭ povo. Sinjoro la Prezidanto de la Respubliko ekzemple prenis sur sin la protektorecon pri la lasta mondkongreso de Esperanto en Nürnberg, kaj la kompetenta ŝtatssekretario laŭ lia komisiono persone ĉeestis la kongreson kaj je tiu ĉi okazo esprimis ankaŭ la intereson de Sinjoro Prezidanto de la Respubliko kaj de Sinjoro la Ministro de Internaj Aferoj por la movado de monda helplingvo. Mi permesas al mi en la aldono transsendi kopie raporton pri tiu kongreso, kiun siatempe faris al mi la direktoro de la Esperanto Instituto de la Germana Respubliko kaj kiu donas kelkan informon pri la celoj kaj la stato de l' movado. Mi salutas, ke la instru-administracio ankaŭ en nepresaj landoj en pli alta grado turnas sian intereson al Esperanto.


Subskribo: D-o Jarres.

## Nova sukceso en radiosfero de Meksiko.

La meksikaj samideanoj sukcesis atingi la permeson por fari paroladojn kaj Esp.-lecionojn de la Radio-Ŝtacio C. Y. L. en Mexico D. F. La ŝtacio apartenas al la granda ĵurnalo „El Universal de Mexico“.

La prezentadoj en Esperanto okazas ĉiusabate je la 13,30 h.

Oni ankaŭ preparas sendaĵojn de la ŝtacio C. Y. L. de granda cigarfabriko „El buen tono“. Se esperantistoj, foiroj, komercaj ĉambroj kaj radiostacioj



Rigardo de la Liebighelpido al Reichenberg—Liberec kaj la Jeschken-montaro.

## Reichenberg-Liberec.

Proksime apud la limo de Bohemujo kontraŭ Saksujo kaj Prusa Silezio estas ĉarme kuŝanta en la valo de la rivereto Neisse la urbo Reichenberg, la metropolo de norda Bohemujo kun 70000 enloĝantoj kun la antaŭlokoj. Ĝi estas unu el la plej industriaj kaj komercotraj urboj de Ĉeĥoslovakio.

Dum la regada tempo de la Reĝo Przemysl Otakar II. (1248—1278) la urbo estis fondata de sileziaj enmigrintoj, kiuj unue okupiĝis pri agrikulturo. Sed la ŝtona arborega fando baldaŭ devigis ilin serĉi alian okupon, kiun ili trovis en la teksado de lino. Tiam ne ekzistis domo, en kiu ne staris almenaŭ unu linoteksilo. Sed kiam la teksistoj sciigis, ke la teksado de drapo farigis pli profitdona, malaperis iom post iom la linoteksado. En la jaro 1577 la imperiestro Rudolf II donis al Reichenberg propran privilegion. Sed per la kontraŭreformacia bataladoj estis la disvolvigo de la urbo tre malhelpata, ĉar dum tiu ĉi tempo post la batalo sur la blanka monto apud Praha (1620) multaj protestantaj loĝantoj devis forlasi la landon.

La enkonduko de la maŝinoj en la drapoteksado komenciĝis novan epokon. Nun la teksindustrio evoluis, la urbo ekfloris, pligrandiĝis tiamaniere, ke Reichenberg kaj ĝia ĉirkaŭaĵo hodiaŭ estas la centro de multaj grandaj fabrikoj de lanaĵo, duonlanaĵo, kotono kaj tapiŝoj kaj ne vane ĝi ricevis la titolon „Neisse-Manchester“. La plej granda teksindustria entrepreno estas la mondkonata firmao Johann Liebig & Komp., kiu okupas propran urbokvartalon per siaj fabrikoj, la Josefina (Jozefino) kaj la Liebiggaltajon kun vidinda ĝardenurbo, kie la firmao por siaj laboristoj kaj oficistoj konstruis belajn vilaĝojn, loĝdomojn, hejmojn kaj lernejojn.

Krom la teksindustrio kun ĝiaj helpindustrioj kiel tinturejoj, fulejoj, apreturejoj ktp. ni trovas ankoraŭ aliajn industribrandojn, ekz. famekonatajn fabrikojn de fortepiano, grandajn presejojn. Ankaŭ la metal- kaj ferindustrio estas reprezentata.

Same kun la industrio la komercio evoluis potence en la urbo. Multaj financ- kaj komerc-institutoj kaj entreprenoj, la komerca ĉambro kaj la internaciaj foiroj koncentrigas la komercan kaj ekonomian vivon ĉi tie. La Foiro de Reichenberg, kiu ĉiujare dum la monato aŭgusto okazas, estas fondita dum jaro 1920 kiel unua foiro en la tuta respubliko.

Dum la lastaj jardekoj famiĝis la urbo ankaŭ kiel urbo de lernejoj. Inter la multaj ĉiustepaj lernejoj (Daŭrigo sur la 2-a paĝo.)

uzantaj Esperanton sendos taŭgajn propagandilojn al la direkto, ili povos frege akceli la preparojn. Adreso: Inĝeniero José I. Reynoso, Gerente de la Fabrica de cigarros „El buen tono“, Plaza San Juan, Mexico, D. F. (Meksiko). S. P.

## Esp.-parolado radiotelefona en Urugvajo.

S-o H. Legrand en Montevideo sciigas, ke li post ne longe faros de granda urugvaja stacio radio-paroladon pri „Radiotelefonio kaj la lingvoj“, parolante parte en Esperanto.

Detaloj sekvos ankoraŭ. Li ankaŭ paroladas en Esperanto je mallongaj distancoj per propra sendaparato.

## Internacia Radio-Asocio.

Unua bulteno.

Mi kun plezuro prezentas la unuan bultenon de la Internacia Radio-Asocio. Unue mi ŝuldas dankon al la centoj da samideanoj, kiuj afable skribis al la Sekretario de la American Radio Relay League, rekomendante ke ĝi alprenu Esperanton. Mi povas konstati, ke la Ligo estis tiom supersufiĉa de komunikadoj, ke ili definitive decidis ne alpreni alian internacian lingvon (kiun ili antaŭe emis subteni), sed venis al la konkludo, ke, se ili devos alpreni ian lingvon internacian, neniu krom Esperanto taŭgas.

Internacia Unio de Radio-Amatoroj. En Paris je la 13 marto okazis internacia konferenco de naciaj amatoraj radio-societoj, por diskuti la fondon de internacia organizo por la radio-amatoroj, kaj ankaŭ por konsideri la elekton de internacia lingvo por tiu organizo. Oni decidis fondi la „Internacia Unio de Radio-Amatoroj“, kaj elektis kiel prezidanton s-o H. P. Maxim (prez. de la American Radio Relay League), kaj kiel sekretarion D-on Pierre Corret. Dum la diskuto, la pretendoj de Esperanto estis konsiderataj. Oni fine decidis aranĝi internacian kongreson dum la venonta jaro por definitive fondi la novan organizon kaj ankaŭ elekti internacian lingvon.

Membroj de I. R. A. Mi tre ĝojas pri la ĝisnuna rezulto de niaj petoj por membroj, dank al bonvolo de la redaktoroj de la esperantaj gazetoj, kiuj presigis mian unuan alvokon. Jam personoj aliĝis el la jenaj landoj: Aŭstrio, Belgio, Britujo, Ĉeĥoslovakio, Danujo, Francujo, Germanujo, Hispanujo, Italujo, Kanado, Latio, Nederlando, Polujo, Portugalujo, Rumanujo, Svedujo.

Mi pretegas adresaron de la I. R. A., kiun mi baldaŭ dissendas al la membroj.

La kotizaĵo al nia Asocio estas tre malalta. Mi tre petas, ke ĉiu, kiu aŭ posedas radio-aparaton aŭ almenaŭ interesiĝas pri radio, nepre aliĝu. Speciale mi petas ĉiun, kiu posedas sendaparaton, ke li aliĝu. Mi ankaŭ esperas, ke samideanoj varbos membrojn inter siaj neesperantistaj radio-amikoj. Ilin ni ankaŭ bezonas.

Naciaj sekretarioj. Por plej bone organizi nian Asocion, estas decidite elekti en ĉiu lando Nacian Sekretarion, kiu prizorgos en sia lando

la varbadon de membroj, radio-propagandon ktp. Mi baldaŭ kompilos liston de Naciaj Sekretarioj elektitaj.

**Oficiala organo.** Mi deziras anonci, ke ĝis nun nia Asocio ne elektis oficialan organon, kaj do, neniŭ gazeto rajtas diri, ke ĝi estas la oficiala organo de I. R. A. Kelkaj esperantaj gazetoj afable proponis sin kiel provizoran oficialan organon, sed almenaŭ nunmomente ni ne povas decidi tiun aferon.

**Brodkastado.** Unu el la ĉefaj celoj de I. R. A. krom propagando inter amatoroj estas propagando ĉe la diversaj brodkastaj stacioj. Jam en kelkaj landoj oni permesis paroladojn aŭ pri aŭ per Esperanto, kaj sendube en la estonteco tiuj paroladoj multobliĝos.

La diversaj paroladoj, kiuj okazis ĝis nun, estas pli-malpli kvazaŭ eksperimentoj de la radio-telefonaj stacioj. Ili kompreneble deziras scii, ĉu multaj personoj efektive bezonas tiajn paroladojn, kaj ilia sola rimedo por eltrovi tion, estas ricevi de aŭdintoj raportojn pri ricevo de la paroladoj. Mi do urĝe petas ĉiun samideanon, kiu aŭdas esperantan paroladon de iu stacio, ke li tuj sendu poŝtkarton en Esperanto al la stacio koncernita. Per tio li faros bonan propagandon.

Hon.-sek.: H. A. Epton, 17 Chatsworth Rd., London, E. 5., Angliolando.

## 4. Intern. Katolika Kongreso.

Venezia, 15—20 aŭgusto 1924.

La 4. Internacia Kongreso Katolika preparata per Internacio Katolika okazas 15—20 aŭgusto en Venezia. La ĉefa temo estas la Internacia Semajno por paco de Kristo, kie mondkonataj teologoj kaj fakuloj detale traktos pri la kristanaj principoj de la paco. Okazos speciala propagand-kunveno por Esperanto, preparata per la Itala Katolika Unigo Esperantista kiel ĝia 4. Kongreso Nacia. Ĉiuj katolikaj samideanoj estas kore invitataj, profitigi de tiu ĉi favorega okazo, por propagandi Esp. ĉe la pioniroj de la internacia agado katolika. Plurajn informojn donas la lka-Oficejo, Zug, Svislando, aŭ la loka komitato Prof. Pizzi, Venezia, Campiello Fenice 1924.

### Internacio Katolika.

Al ĉiuj katolikaj samideanoj ni komunikas, ke depost 1-a de majo la „Centra Oficejo de lka“ kaj la redakcio de „Katolika Mondo“ troviĝas en Zug, Svislando. Sufiĉa adreso: lka, Zug, Svislando.

## Esperanto en meksikaj lernejoj.

La meksikaj esp. grupoj klopodas senlace enkonduki Esp. en la duagradaĵn kaj komercajn lernejojn de la Meksika Respubliko; sed por certigi sukceson je iliaj klopodoj estas urĝe necesega, ke oni sendu al la Meksika Registaro taŭgajn dokumentojn, petskribojn, propagandilojn, leterojn.

Adreso: S-o Lic. Jose Vasconcelos, Sekretario de Educacion Publica, Mexiko D. F.

Esp. gazetoj estas petataj represj.

## Interfoira Komisiono.


De l' prezidanto de la Interfoira Komisiono ni ricevis la sekvantan cirkuleron kun la peto pri publikigo:

Kvankam mi forsendis la leterojn por la komisionanoj regule al 22 foiroj, kiuj antaŭe montris intereson por la propagando per Esperanto, mi ne sukcesis havigi al mi la respondojn de ĉiuj. Al mia letero de la 20. 8. 23 respondis nur 7 foiroj. Al nova letero rekomendita de la 10. 4. 24., en kiu mi demandis, ĉu oni konsentus Interfoiran Konferencon en Wien — dum la tempo de la kongreso, sed ekster la kongresaranĝoj — ĝis nun respondis nur 10 foiroj. (Nome: Basel, Barcelona, Bordeaux, Budapest, Frankfurt a. M., Königsberg, Leipzig, Ljubljana, Lyon, Reichenberg.)

Mi urĝe petas la Esperanto-Fakulojn de la nerespondintaj Internaciaj Foiroj kaj ĉi tiujn, kiuj en la pasinta jaro klopodis pri la enkonduko de Esperanto en la foirojn, ke ili tuj vizitu sian foirdirektoraron kaj demandu, kial oni ĝis nun ne respondis, kaj ĉu la koncerna foiro ankoraŭ volas partopreni la laboron de nia Interfoira Komisiono. Ĝi bezonas la respondojn kiel eble plej baldaŭ; se mi ne ricevos ilin ĝis 15-a de junio, mi ne sukcesos, sufiĉe taŭge prepari kaj aranĝi novan konferencon en Wien.

Leipzig, 14 majo 1924.


La prezidanto:  
D-o Dietterle.



Jeschken-domo.

(Daŭrigo de Reichenberg-Liberec.)  
ejoj akiris precipe famon malproksimen trans la landlimojn la speciala lernejo por teksindustrio kaj la metia lernejo. Arto kaj scienco estas ĉi-maniere protektataj.

La ekflorado ŝanĝis kompreneble baldaŭ la



Rigardo al la operejo kaj la urbdomo.

aspekton de la malnova urbo. Dume ĝi ankoraŭ en la 19-a jarcento estis landurbeto kun ter- kaj unuetaĝaj dometoj, nun modernaj domoj kaj palacoj formas la stratojn kaj placojn, sur kiuj ĉiam estas viglaj vivo kaj interkomunikado. Sur la urboplaco staras libere kaj fiere la urbdomo, kun sia 56 m alta ĉefturo, malantaŭ ĝi la urbo-teatro kaj la ĉefpoŝtkonstruaĵo. Malproksime de tie la antikva kastelo de la familio Clam-Gallas, kaj la belega ŝparkasopalaco. En la Siebenhäuser-strato kondukanta al la „popolĝardeno“ (urboparko) troviĝas la bela nordbohema metia muzeo, kun multaj valoraj trezoroj pri la evoluo de industrio kaj metio en norda Bohemio, plue la komerca ĉambro kaj la moderna banejdomo. Sur la deklivoj de la lsermontaro estiĝis nova ĉarma urbokvartalo, la vilaokvartalo kun la urbo-parko, la idilia gondolageto kaj la zoologia ĝardeno. Aliaj modernaj kaj interesaj konstruaĵoj estas tiuj de kelkaj socialaj institucioj (kriplul-hejmo, junularoficejo, sanatorioj, kremaciejo (la unua en la tuta respubliko) kun bela urnoarbar-eto ktp.

Kelkaj tramveturilaj kaj aŭtobusaj linioj kondukas al la ĉirkaŭaĵo kaj 5 fervojlinioj interligas la urbon kun ĉiuj mondirektoj.

La ĉirkaŭaĵo de Reichenberg estas ĉarma. Sude etendiĝas la giganta masivo de la Jeskenmontaro, alte kaj majeste kun la vulkanforma Jeskenpinto (1013 m) kaj sur ĝi kiel kastelo la Jeskendomo. Somere kaj vintre estas tiu ĉi belvedero la celo de turistoj el proksima kaj malproksima, aŭ por ĝui la grandiozan perspektivon trans bela Bohemlando aŭ dum vintro uzi la famkonatan glitvojon. Carmaj valoj kun vilaĝoj kaj modernaj urboj, sude lagoj kaj strange konusformaj montoj kun kasteloj kaj ruinoj, okcidente la montoj de Saksa Luzacio kaj norde la arbaraj ondoj de la lsermontaro kaj malantaŭ ĝi la nekovrita Riesengebirge (Gigantmontaro) blanka kaj brelitanta. Dum klara vetero ekbrilas sude kiel argenta rubando la rivero Elbe kaj okaze oni ekvidas eĉ la turojn de la ĉefurbo Praha.

Norde de la urbo tuj malantaŭ la popolĝardeno levigas la kastelkronita Schmiedstein (Forĝistostono, 800 m alta) kaj la larĝdorsaj montoj de la lsermontaro, trans kiu kondukas horlongaj bone zorgitaj kaj markitaj promenad- kaj migrad-vojoj ĝis la landlimo kaj al la Riesengebirge (Gigantmontaro).

Rigardante de la proksimaj altaĵoj en la Neissevalon oni ne forgesas la pli belan bildon de la vaste etendiĝanta urbo, kies ruĝaj kaj bluj tegmentoj kaj turoj kuŝas en la sunbrilo, dume la

fumo de la kamentubegaroj kovras per ruĝebrunaj vualoj la fabrikejajn kvartalojn.

Strangaj kontrastoj estas tuj apude. Jen la polvo kaj fumo de la fabrikejoj kaj jen la helaj parkoj kaj floricaj herbejoj, jen la bruaĵo de maŝinoj kaj veturiloj kaj jen la muĝetanta arbaro, sub kies ĉiamverdaj fagoj kaj abioj fontoklaraj akvoj murmuris.

Sed venu, esperantistoj, kaj rigardu mem!

Anton Hübner, Reichenberg.

## II-a Ĉeĥoslovaka Esperanto Kongreso Reichenberg-Liberec, Pentekosto 1924.

(7—9 junio 1924)

sub la aŭspicioj de la magistrato kaj de la Komerca Ĉambro.

La antaŭlaboroj por la kongreso progresas kaj la nombro de la aliĝintoj ĉiutage kreskas. La provizora programo estas jena:

**Sabato:**

posttagmeze: Akceptado,  
vespere: Interkonatiĝa vespero kun koncerto.

**Dimanĉo:**

antaŭtagmeze: Malfermo kunsido,  
tagmeze: Komuna tagmanĝo,  
posttagmeze: I-a laborkunsido,

vespere: Festvespero.

**Lundo:**

antaŭtagmeze: II-a laborkunsido  
kaj rezolucioj,  
posttagmeze: Ekskurso.

Fakkunsidoj okazos jenaj:  
Dimanĉo de UEA, lundon de UEA (junularo) kaj de la ŝtate ekzamenitaj geinstruistoj de Ĉeĥoslovakio.

Kongreskotizo: 15 ĉeĥoslovakaj kronoj.

En- kaj eksterlandaj gesamideanoj vizitu laŭeble tre multnombrenian kongreson kaj estu ĉiuj tre kore bonvenantaj en la malnova „drapista urbo“ en Reichenberg.

Por konvenaj loĝejoj en hoteloj kaj en privataj domoj je prezo de 16 ĝis 18 kronoj po lito (ankaŭ komunaj loĝejoj por la junularo kaj studentaro ekzistas je malaltaj prezoj) kaj por bona komuna tagmanĝo de 9 kĉ. po persono la L. K. K. zorgis. La festprogramo estas tiamaniere aranĝita ke ĉiuj gekongresanoj estos kontentigitaj.

Tiu, kiu intencas viziti la kongreson kaj ĝis nun ankoraŭ ne ricevis aliĝilon, bonvolu tuj postuli ĝin laŭ adreso: „Esperanto Kongreso“ Reichenberg.

Geesperantistoj en Ĉeĥoslovakio. Ĉu vi jam ĉiu aliĝis? Se ne, aliĝu tuj!

La Loka Kongresa Komitato.  
Karl Schüller, sekretario.

## IV-a Kongreso de S. A. T.

**Kongreskomitato:** K-doj Basteels, Bergiers, Desmet, van Aelst.

**Kongresadreso:** K-do Basteels G., 19 rue de Sebastopol, Anderlecht-Bruxelles (Belgujo).

**Kongreskotizo:** Nederlando, Britujo, Usono, Hispanujo, Finnio, Japanujo, Svislando, Norvegujo, Svedujo, Danujo: pagos 1 dolaron aŭ egalan sumon en nacia mono.

Belgujo, Francujo, Italujo, Ĉeĥoslovakio, Portugalujo: pagos 1/2 dolaron aŭ egalan sumon en nacia mono.

Germanujo, Polujo, Aŭstrujo, Rusujo, Hungarujo, Rumanujo, Bulgarujo, Estonio, Jugoslavio: pagos: 1/4 dolaron.

Post la 1 julio la kotizo altiĝos je 50%. Oni pagu prefere per dolaro, franca franko aŭ bonvaluta mono en registrita letero, aŭ per poŝtmandato internacia. (La belgaj k-doj pagu per poŝtĉekkonto n-o 124801, Esperantista Laborista Grupo, Anderlecht-Bruxelles).

Oni tekstus legeble sian aliĝilon laŭ jena ordo: Familia nomo, antaŭnomo, aĝo, profesio, strato kaj numero, urbo, lando, SAT-matrikulo.

Oni sendu aliĝilon, kotizon kaj ĉion prikongresan al k-do: Basteels G., 19 rue de Sebastopol, Anderlecht-Bruxelles (Belgujo).

Ĉiujn detalojn oni legu en ĉiu n-o de „Sen-nacieca Revuo“.

Komitato de l' IV-a Satkongreso.

## Unua radiotelefona disaŭdigo en Esperanto en Nederlando.

La 14 junio, vespere je la 8,30 horo, nederlanda somertempo (7,10 horo laŭsuna tempo de Greenwich), parolas de la Radio-stacio de s-o Middelraad en Ymuiden (PCMM, 1050 M.) s-o J. R. G. Isbrücker, parte holandlingve pri Esperanto, parte en Esperanto. Li petas ĉiun, kiu aŭdos lian paroladon, sendi al li scilignon pri la rezultato laŭ adreso: v. Beverningkstraat 10, Hago, Holando.

# Kroniko.

Por servi nian legantaron per ĉiam aktuala, fidinda kaj komplete informara, ni bezonas sciigoti (sur postkarto aŭ aparta folieto unuflanke skribita, sed ne inter administrativaj privataj sciigoj) pri ĉiu novaĵo el la esp. movado, kondiĉoj, radice, koncize, fidinde, legeble (precipe nomoj).

## Ameriko.

### Urugvajo.

Montevideo. Laŭ konsento kun la instrua konsilantaro s-o Fernandez gvidas senpagon kurson por instruistoj en Pedagogia Muzeo (oficiala institucio).

## Eŭropo.

### Ĉeĥoslovakio.

Ĉeĥoslovaka Esperanta Instituto en Praha aranĝinte dum la printempa foiro esperantan standon, vizitinte interalie de s-o Srba, ĉs. ministro por publikaj laboroj, transdonis al ekspozitioj presierpentajn informilojn. 26. 5. okazis parolado de D-o Konopásek pri „Esperanta verbo“. Privataj esp. lernejoj de ĈEJ estas termitaj 5. 4. per ekzamenoj, faritaj de 6 gelnantoj (plua 3 faris ŝtatan ekzamenon), 17 ricevis ateston pri vizitado. — Esperantan kaj radiafonan konferencojn en Ĝenevo ĉeestis s-o Pihlik, oficiala delegito de ĈEJ kaj „Radioslavia“, kiu raportis pri la ĉiujaraj rezultoj en membra kunveno de ĈEJ (30. 4.), Esp. Klubo (9. 5.) kaj Rondelo (10. 5.). — Por la monsubteno (1000 Kč.), ricevite de la instrua ministerio, ĈEJ aĉetis 100 librojn kiel bazon de la fondata publika biblioteko esp. — ĈEJ fondis propagandan UEA sektion, estrotan de la prezidanto de ĈEJ. — Ĉs. fervoiministerio helpe de ĈEJ eldonis por la ĉeestantaro de la XVI-a en Wien esperantan ilustritan propagandilon. — ĈEJ publikigis en „Radiojournal“ kaj „Radioelegrafie“ artikolojn „Esperanto kaj radio“.

Prešov. La movado estas vigla, tri kursoj funkcias; unu estas gvidata de s-ano Matejovský por laboristoj; alia de s-ano Schwartz por la laborista orkestro; plia de D-o Austerlily, del. UEA. Fondiĝis laborista grupo „Interkompreno“. Baldaŭ fondiĝos neutrala grupo.

### Germanujo.

Chemnitz. Novaj kursoj komenciĝis por komenculoj (gvid. F. lino Krüger) kaj por progresuloj (gvid. sup. instr. E. Klemm, kiu ankaŭ faris publikan paroladon en la „Stata Akademio“).

Kemtau (Erzgeb.). S-o Lucha el Harthau finis kurson kun 15 partoprenintoj. Grupo estas fondita.

Bad Kreuznach. La loka grupo komencis la 6 majo novan kurson por plenkreskuloj en la liceo kun 24 partoprenantoj. La 9 majo ankaŭ komenciĝis nova kurso inter la membroj de la „Germana metallaborista asocio“ kun 21 partoprenantoj.

Freiberg. Je la 30. 4. okazis nova kurso por komencantoj. 45 partoprenantoj aliĝis. Gvid. s-o K. Spigner, vicdel. de UEA.

Landshut. La loka grupo de Germana Esperanto Asocio ne plu kunvenas en la bierfarejo Koller, sed en la restoracio „Zur Ludwigsburg“, Münchenerstr. 15.

### Esperanto Ligo Saarteritoria

Saarbrücken. La Esperanto-Ligo Saarteritoria aranĝis la 4. 5. 24 en gastejo Horch, Saarbrücken, sian ĉiunajn kunvenon sub prezidanteco de s-o Krämer; okazis raportoj de la sekretario s-o J. Schenkel pri la agado depost la fondiĝo de la ligo ĝis nun. La ligo staras nun forta kaj la ekstera laboro povas komenciĝi. La nuna stato estas: 4 grupoj kun 100 membroj. La sekvinta kasraporto estis kontentiga. — Laŭvice raportis nun pri grupa agado s-o J. Krämer por Saarbrücken, Donien por Friedrichsthal, Gerlach por Neunkirchen kaj s-ino Bonaventura por Ostweiler. Si finis per ĉarma versaĵo. S-o Omlor parolis pri la stato en St. Ingbert, kie baldaŭ fondiĝos grupo. La nuna estraro estas reelekta. Per sekvanta parolado s-o Omlor klarigis la esenceon de la Esperantomovado kaj citis la slovan, kie Esperanto estas aplikata. S-o Meistermann ŭstiris propagandafoliojn. Fine s-o Omlor faris paroladon pri UEA. Nova kurso komenciĝos en Saarbrücken. J. Sch.

### Italujo.

Torino. — S-ano Gandolfi Vittorio fervoja sekretario malfermis novan kurson por fervojistoj en la Fervoja lernejo de la Centra Stacidomo de Torino P. N. La tre grava ilustrita ĵurnalo „Illustrazione del Popolo“ — publikigis kun favoraj vortoj la fotografadojn de la „Fervojista Grupo de Torino“ la unua fondita en Italio (5 nov. 1920) kaj kies nuna gvidanto estas s-o Ramolfo prez., Gandolfi sekret. Colomano bibl., Bandino, Bisetini, Cirincione kaj Santoni konsilantoj. —

Dum la IX-a Itala Kongreso de Esp. en Torino okazos grava fakkunveno de italiaj fervojistoj kaj oficiala starigo de la „Itala Fervojista Esp. Asocio“. Adreso: Via Sacchi n-o 5. — Torino.

Udine. — La 2 majo, ĉe loka Reĝa Instituto, okazis la unua ĵarkunveno de la Udinea Esperanta Grupo. Pro ĉirkaŭstancoj diversspecaj, sed ĉefe pro manko de konvena kaj taŭga grupo-sidejo, la propagando-laboroj estis preskaŭ nulaj. Nuna estraro estas: Honora prez. D-o Prof. Barono Enrico Morpurgo (prez. de Popola Universitato) — prez. Agostino Comons; vic-prez. Danie Valzacchi; sek. kas. Johano Della Savia. — De nun, la renkontoje de la grupanoj restas fiksita ĉe „Kafejo Roma“ en la urba centra parto. J. D. S.

### Nederlando.

La 17 majo s-o J. Ravestein jr. el s-Gravenhage, laŭ invito de la debatkulubo de la Societo de gelnantoj de la alburga lernejo „Libanon“, faris propagandaparoladon en Rotterdam pri Esperanto. Ĉeestis 35 gelnuloj. — La lumbildoj pri la Helsingfors kongreso, la ekspozicio de ĵurnaloj kaj literaturo tre impresis.

### Polujo.

Kolomea. Finiĝis kurso ĉe ukraina knabina skola societo, kun 22 knabinoj, plejparte gimnazianoj.

## Instruistoj! Junularo!

La ĵarlibro de T. A. E. G. kaj U. E. A. J. nun estas preparata. Ĝi estas komuna por edukistoj kaj edukatoj kaj enhavas 4000 adresojn. Por ricevi la ĵarlibron vi pagu ĵuj vian ĵarkotizon por „Novaj Tempoj!“ al s-o Goldberg, Leipzig-Co., Klemmsr. 14 p. aŭ por „Esperantista Junularo“ al Alfred Neupert, Leipzig-Möckern, Wedellstr. 17. (La ĵarkotizo por Esp. Junularo estas la kosto de afranko de letero eksterlandan!)

## Esperanta etimologio.

### La bulgara lingvo kaj Esperanto.

Sendube ni bulgarioj ne povas fanfaroni, ke nia lingvo same servis kiel fonto, el kiu la kreantoj de l' esp. vortaro ĉerpis materialon (kvankam efektive en Esp. ekzistas ankaŭ bulg. vortoj: vojevodo, levo ktp.). Sed konstatinda estas la fakto, ke en bulgara estas troveblaj multaj samradikaj vortoj: angel<sup>1)</sup>, aĝal<sup>2)</sup>, peká (baki), varél (barelo), varka (barko), bleja (bleki), bivól (bubalo), car, cel, ti (ci), ĉar (ĉarmo, oĉarovam — ĉarmi), ĉereša (ĉerizo), ĉerpija (ĉerpi), dom, eho, postja (fasti), fasúl (fazeolo), flag, plam (flamo), furna (forno), presen (freŝa), gost (gasto), gradina (ĝardeno), kuka (hoko), igó (jugo), kaša (kaĉo), kaljaska (kaleŝo), konóp (kanabo), kanapé (kanapo), kotka (kato), garvan (korvo), lešta (lento), len (lino), majstor (majstro), maŝga (vulgarmiso: maŝgaĵo), moré (maro), mida (mitulo), smárt (morto), mártav — morta), mást (moŝto), melja (mueli), mule (mulo), mármorja (murmuri), mramor (marmoro), muhá (muŝo), sneg (neĝo), nepremeno (nepre), gnezdo (nesto), ne, nie (ni), noŝt (nokto), nov (nova), okó (okulo), kost (osto), palko, piperka (papriko), paún (pavo), bljudo (plado), plejá (plekti), pálen (plena), po, pop, porta (porĉo), post (posteno), prav (prava), grabja (rabi), rjapa (rapo), oriz (rizo), rosá (roso), sábota (sabato), sabja (sablja — sabro), sol (salo), sam (sama), sapún (sapo), sit (sata), suh (seka), sedló (selo), seme (semo), ŝest (ses), si, sed á (ŝidi), stomáh, siranen (sirango), suča, smuča (suĉi), sok (suko), svat (svatanto, svatuvam — svaiti), ŉakál, ŝal, tas, domaia (tomato), tri, tron, ŭkaz, vosák (vaksó), verno (vere), vie (vi), vidja, viđdam (vidi), vino, jiv (viva), vikam (voki), volja (volo), zigzag k. a.

### Esperantaj afiksoj en bulgara.

an: hristianin — kristano, seljanin — vilaĝano, grájdánin — urbano, sofianec — sofiano.

ar: Kámara — ŝtonaro.

ĉj: Ivanĉo, Dimĉo, ĉoveĉe (hometo), stolĉe (seĝeto).

eg: májaga (virego), junaĉaga (bravulego).

il: ioĉilka, ŝilo, butilo, kandilo, plaŝilo, hodilo, bodil, belilo, sinilo, ĉernilo, ĉervilo.<sup>3)</sup>

in: Angelina (virina nomo, la vira — Angel), turkinja, knjaginja (prinĉino), carkinja (reĝino).

nj: Tanja, Vanja, Sonja.

pra: pradajo (praavo), pravnuĉ (pronepo, nepifano), praistórija (prahistorio).

mal: malák — malgranda, malĉinstiv — malplimulto.

Kompilis Dimitri Z. Varua.

<sup>1)</sup> anĝelo; la akcento falas sur la antaŭlastan silabon, krom ĉe la signitaj (') vortoj.

<sup>2)</sup> á — elparolata kiel la liero i en angla „sir“; aĝal — anĝulo.

<sup>3)</sup> paspliatigilo, aleno, buterbatilo, bruilgilo, (-ujo), ŝimigilo, plando (trilo), pikilo, blankigilo (farbo), blugigilo, nigrigilo, rugigilo.

## Aperta letero al s-oj Dombrowski kaj Medem.

(Respondo.)

Mi premias ke la redakcio de ET faris al mi malbonan servon ne publikinte miajn respondojn al kritikoj. Kia ĉefa respondo mi konsilas s-ojn D. kaj M.: atentege legi konsideri mediiĉin diras Zamenhof en „Fundamenta Krestomatio“ pri a rta lingvo internacia: atentege legi konsideri mediiĉin la premon al „Fundamento“. El tia studo rezultos ĉu ne fanatikeco aŭ kondamnanon estas la protestoj kontre homo kiu sakrifika sian vivon por la idealo Esperanto.

La 15 (fatala kombino de la 15-a & 3 internacieco!) malbonaj povus esti anke legitimaj internaciaĵoj aŭ nur novaj radikombinaĵoj. Oni devis ilin indiki. Esperanto havas nek specialan sintakson nek frazkonstruon. Gramatiko estas nur la finaj kaj vokabulkompozoj. Etimologion mi bone konas por decidi kiam vokabulo estas sole kaprico stultaj rebuso aŭ alia nur-esperantaĵo aŭ Volapükajo.

Mi skribis ion komplike pro tro da novigepreokupacio sed ĉu nun mi zorgos esti pli akurata kaj prudenta se okazas mi reskribos en ĵurnaloj kaj mi ne volas plu tro ĝeni respiciataĵoj samidandajn anke se ili ne komprenas la uĝon de perfektigita evoluo.

Certe pro ĉia neprudenta agmanieroj mi kompromitis anke la reputacion de miaj novaj verkoj, sed oni bonvolu rimarki ke ili ne enhavas tian experimentajn evoluojn. Nur kelkaj internaciaj radikoj ĉnestas preske ĉiuj trovitaj ĉe aliaj leksikistoj.

Mi pretendas esti estinta kaj esti unu el la bonaj fidelaĵ al Zamenhofprincipe L. K.-anoj kaj mi ne rezignos mian raitan lokon. Nur fanatika ekskomuniko povas min injuste forpeli, ĉar la tero turniĝas — diris Galilei aŭskultante la kondamnon — kaj efektive miaj ideoj fariĝas praktikataj tuttage de leksikistoj, ĵurnalistoj kaj skriptoroj. Ja en la poezio „Al Majstro“ presita de la ĵusa „Revuo“ bele aspektas *graco flagrantam amordonaj, la kvant' de, kaj redemptio. Dank' al Dio Kreatoro Redemptoro Editoro mediacio mediati mediatoro ktp. ktp.* estas praktikata kontre la ĵargonigaj ridindaj enigmoj *Kreinto Sarvinto Eldonisto pero pero peranto.* Al la pedantoj komprenantaj nek interkneismon nek paralelismojn nek reintegeantajn evoluojn restas nur apertaj la okulojn por konstati kaj plendi sentute se ili obstinas ne sekvi la verajn pionirojn laborantaj por la triumfo de Esp kaj por la gloro de Zamenhof. Ĉu ili intencas ne evoluigi Esp-on por ke ĝi nuliĝu triumfos? Tia-kaze nur ili estas la perfidantoj kaj estas ilia devo silenti kaj ne porti senkonsidere aŭ fanatisme la diskordon en nian liberan tendaron!

Ne ĉiuj kiuj diras: Sinjoro! Sinjoro! eniros la ĉiel-regnon! El ili estas anke la stultaj virginoj kiuj atendis la adventon de la sponso kun senoleaj lampadoj!

Mi esperas ke la aliaj L. K.-anoj jam povis seĝe aĉeli la oleon por lumigi la obskuran kaj, vidinte la veron, ne sekvos la konsilon de la protestintoj.

Akademio pro Interlingva estas neutralintencnaciilingva Asocio kaj sidas en ĝi nur kiel Esperantistoj. Idente ĉi sidas Migliorini (Akademiano), Tellini (L. K.), Kolovrat,

Palmezziani, Pizzi, Rinaldi, kaj aliaj eksteraj esperantistoj. Oni devas defendi Esperanton kie ajn, se oni ne volas ke aliaj ĝin superos.

Mi anke silentos se oni pruvos ke miaj rezonadoj ne estas logike Zamenhofprincipi. pro kio: Esperanto devas esti „vere internacia en siaj elementoj“ komprenata „sen peno = facile = a prima vista“ de ĉiuj civilizitaj homoj ĉar inverse la vokabulo „internacia“ estas esprimo sole perfida ne komprenanta de bonedukitaj personoj.

Prof. G. Meazzini, L. K., Firenze, San Giovanni Valdarno.

### Rimarko de la redakcio.

Por montri nian lojalecon ni represas laŭ originalo sen tuj ŝanĝi la malferman leteron de s-o Prof. Meazzini, celante defendi sin. Ni samtempe finas ĉiun ĉi diskuton kaj lasas al ambaŭ disputantaj partioj persone dabiĝi ĝin.

Pro manko de loko ni ne povas aldoni lingvajn rimarkojn. Eventuale interesatoj sin turnu al la aŭtoro laŭ subskribita adreso.

## Libera tribuneto.

Sub tiu ĉi rubriko laŭ disponebla loko estas lojale impresataj ĉiuj sciigoj, informoj, kritikoj, liberaj vortoj ktp. La redakcio tamen ne turnas sur sia ĵun respondecon pri la enhavo, sed ĝi rezervas al si la rajton eventuale rifuzi neĵuajn artikolojn.

### 265. Radio-faktermarino.

Ju pli disvastiĝas la radiotelefonio inter esperantistoj, des pli kreskas la neceseco pri kreo de faka terminaro. Je plej diversaj flankoj mi vidis provojn por kontentigo de l' bezono. Al mi ŝajnas neceso atentigi antaŭ ĉio, ke kiel en aliaj fakoj ankaŭ en ĉi tiu sole per internacia kunlaboro estas ebla krei internacian terminaron.

Multaj esprimoj estas transprenitaj el fremdaj lingvoj en alian kaj ofte estas erare interpretataj. Eviĵ-samoni en Esperanto estas nepre neceso.

Antaŭ ĉio ĵio ŝajnas neceso rilate al la traduko de Broadcasting (brodkasto, disaŭdiĝo, radiotelefono, rond-radio). Sed ankaŭ aliaj esprimoj devas esti revizitataj. Koncerne la kreon de novaj vortoj oni estu tre singardema por eviti konfuzojn. Ekzemplon mi vidis en listo publikigita en „Germana Esperantisto“. La eminenta vortaristo Christaller citas fluo = Strom kaj en krampoj aldonas: kurento, stromo. Mi ne scias, ĉu la du lastaj vortoj estu proponoj aŭ tradukoj. En mia ĝeprata lingvo, la franca, courant estas fluo (current en angla, Strom en germana lingvo). Ĉiuj tri nacioj do tradukas la respektivan vorton per fluo.

Estas superflue kondukdi novan radikon, se iam ekzistas aprobinda vorto en Esperanto. La unua cetero ne respondas al internacia fonetiko. Laŭ itala kaj hispana lingvoj ĝi devus esti korento, laŭ Esperanto: kuranto. Konkludo: fluo = courant, corrente, current, Strom, kuranto = fluo.

Oni evitu de l' komenco konfuzojn, kia ekzistas en multaj aliaj sferoj. Kiam la L. K. kaj la koncernaj faksektioj publikigos definitivajn difinojn?

Marcel Dupris, Mons.

Postskribo de la redakcio. Ni publikigas ĵiun ĉi kritikon, ĉar ĝi konforitiga al nia opinio. Dum la Ĝenev-a konferenco nia hina samidano Ken diris la samon. Pri Broadcasting oni jam parolis en Ĝenevo (komparu la raporton). Broadcasting do estas tradukata per: disaŭdiĝo (radiotelefono) La vorto „brodkasto“ ŝajnas laŭ ni, se ne nepre neceso, rezervinda nur por la angla sistemo de Broadcasting, diferencita al la holandaj kaj aliaj arangoj. La ceteran enhavon de la kritiko ni subskribas plene. Esperinde la koncernaj rondoj kreas perfektan terminaron. La uzon de iam ekzistantaj radikoj ni aprobas, se ili enhavas la fakajn konceptojn esprimotajn. Tiam ankaŭ laŭ nia opinio estas neceso difini en la vortaroj la koncernan esprimon, ekzemple: fluo = akva, elektrika, amortizi kostojn, hipotekon, elektrajn ondojn (radiotelefonio), konverti: altopinianojn, materialon (komp. konvertoro), valorpaperojn, bilojn ktp. R.Kr.

## Al la tutmonda okultistaro.

En la Nürnberg-a kongreso la ĉeestantaj okultistoj aliĝis al Internacia Okultista Unuiĝo. La celo de ĵiun ĉi unuiĝo estas interŝanĝi komunikojn pri okultistaj travivaĵoj, doni konsilojn pri legitima okultista literaturo kaj ebligi la publikigon de okultista biblioteko.

Pro malsano inter la en Nürnberg elektita Berlin-a estraro ĵiun ĉi decidoj ĝis nun ne povis esti plenumigataj. Nun, post forigo de la malhelpaj, la sube menciitaj membroj estas pretaj prianteli la antaŭe nomitajn celojn laŭ povo.

Tial ni faras alvokon al la okultistoj en la tuta mondo por kunlabore, kiu estu ĵia, ke oni sendu al ni skriban materialon pri propraj kaj bone garantiitaj fremdaj travivaĵoj. Ŝajnas al ni ne praktike, preterŝendi ĵiun ĉi materialon en originalo, sed ni pli volonte volas prilabori kaj tiam multobligi ĵin ĉi. Tiamaniere ĉiun okultiston, kiu aliĝis al nia unuiĝo, ne nur ricevas la tutan materialon sed ankaŭ posedas ĵin por ĉiam.

Por realigi niajn projektojn, bonvolu sendi al ni ankaŭ mondonacojn laŭ povo.

Okultistoj, kunigu vin en la tuta mondo!

La estraro de la Internacia Okultista Unuiĝo prez. Ludwig Gube, Berlin-Friedenau, Fregestr. 26 (Postcheck-Ko. Berlin 82245); Heinrich Goldmann, Charlottenburg, Pestalozzistr. 4, kasisto; Hildegard Nickel, Potsdam, Blücherplatz 2, sekretariino.

## Grava por la instruistaro!

Dum aŭgusto k. j. okazos en Varsovio tutmonda kongreso de mezlerneja instruistaro. La kongreson aranĝas pola Towarzystwo Nauzycieli Szkół Średnich i Wyzszych (T. N. S. W. = Asocio de supera instruistaro), helpata de pola ministerio por kulturaj kaj lernejaraj aferoj. Estas necesegge, ke por la kongreso anoncu sin kiom eble plej granda ora da esperantistaj instruistoj; se la anonciĝo estas neebila oni almenaŭ skribu je la adreso: Towarzystwo Nauzycieli Szkół Średnich i Wyzszych, Kongreso Internacia Warszawa, Polujo, postulante la referatojn pri kaj en lingvo internacia. Spéciale interesiĝu pri la afero „Komisiono Lerneja“, elektita en Praha, kaj polaj samidanoj. La subskribinto proponis jam al la estraro la referatun en Esperanto je la tempo: Instruado de lingvoj „fremdaj“ en mezgradaj lernejoj.

Leopold Kronenberg, duma adreso: Opaków Kiel, Gimnazjo, Polujo.

Germana Gejunularo.

Dum la Germ. Esp. Kongreso pentekoston en Plauen okazos la 5-a asocia tago de la Asocio de J. G. E. Aliĝu tuj kaj anoncu la partoprenon al la prez. de l' asocio Kurt Hornung, Auerbach i. V., Königstr. 9 b.

Negocaj informoj.

Jus aperis en la eldonejo de Frankfurter Societats-druckerei Abtg. Buchverlag, Frankfurt a. M., Esperanto-traduko de l' fama libro "Eŭropo ĉe la abismo". Al nia hodiaŭa numero estas aldonita detala prospekt, kiun ni rekomendas al la atento de niaj legantoj. La eldonejeto petis nin scii al niaj legantoj, ke la prezo por la 200-paĝa libro estas eksterordinare malalta. Pro mendoj oni sin turnu al la eldonejo laŭ anonco en ET.

'Esperantista Junularo'

Organo de UEA-Junularo — bela por infana literaturo — Internacia lernejo-servo. Abonprezo po numero 1/2 franko de letero por eksterlando (jare 8 n-oj).

Administracio: A. Neupert, Wedellstr. 17 - Leizig-Möckern, Germ.

Se vi bezonas Esperantaĵojn

postulu la riĉenhavan katalogon de: niaj multe ŝatataj eldonaĵoj! ::

(Lerno- kaj ekzerco-libroj, vortaroj, literaturaj verkoj ĉiusecaj, insignoj, propagandiloj ktp.)

Abonu nian gazeton Germana Esperantisto! La plej malnova el ĉiuj ĉkz. Esp.-gazetoj. Ni liveras akurate kaj al ĉiuj landoj.

Esperanto-Verlag Ellersiek & Borel G. m. b. H., Berlin SW 61, Wilmstrasse 5 (Germanujo)

Jus aperis! Adam Mickiewicz Improvizacio de Konrad dua eldono en majstra traduko de R. J. Dobrzański deklamota dum la XVI-a Kongreso de Esp. en Wien. Prezo: sv. fk. 0.25 Eldonejo Esperantista Voĉo, Jaslo (Pollando).

La plej malmultekosta libro en Esperanto Ĉiu devas nepre posedi la libron Eŭropo ĉe la abismo de Francesco Nitti fama ministrara prezidanto itala Esperanto-traduko kun speciala antaŭparolo de la eminenta aŭtoro. (Preskaŭ 200 paĝoj.) Jus aperis. Prezo 3.— ormarko, Mendu tuj!

Frankfurter Societats-Druckerei G. m. b. H. Abtlg. Buchverlag - Frankfurt a. M. Korespondon en Esperanto. — Ilustritaj kartoj rifuzataj.

Samideano, kiu intencas viziti la fame konatan banlokon Bad Kissingen (Bavarujo) trovas malkaran loĝejon ĉe samideano. Skribu al H. Neubert, supera poŝtinspektoro, Bad Kissingen.

Gazeto, kiu manku en neniuj biblioteko esperantista

INFORMOJ

de Esperanto-Asocio de Estonio.

Ĉiunonate aperante, regule jam pli ol unu jaron (ilustrita, 8-paĝa), "Informoj" liveras al legantoj riĉan materialon, zorgo verkatan de konataj samideanoj, pri Esperanto-societa vivo, organizaj demandoj kaj propagando, lingvan aĉentigojn, adresojn ktp.

Unika

pro sia pure esperanta karaktero!

Konstantaj fakoj: El la Estonia Esperanta movado, Kritiko-Bibliografio, Demandoj k. Respondoj, Faktoj por propagando, diskutoj, "Inter ni" (malfermita al ĉiu leganto) kaj cetera.

Mendu specimenon, ne forgesante aldoni respond-kuponon.

Abonkondiĉoj: Jare 3.50 sv. fk., duonjare 2.— sv. fk., kvaronjare 1 sv. fk. aŭ la ekvivalento per alia mono. — Anoncoj: 1 cm 0,05 sv. fk.

Admin. de Esp.-Asocio de Estonio, Tallinn — poŝtkesto 6.

Ekkonu Italio!

Ilustritaj gvidlibroj: Venecio L. 10, Trentino L. 5.50, Rimini L. 2, Bologna L. 1, Ravenna L. 1, Terni L. 1.

Gramatiko de Itala Lingvo per Esp. L. 15

Vortaro Itala Esperanta (Meazzini) L. 5

Vortaro Esperanta Itala (Meazzini) L. 5

Italaj Rakontoj (De Amicis) L. 5

De Apeninoj ĝis Andoj (De Amicis) L. 2.50

Ŝakludaro (Giaccosa) L. 5

Cavalleria Rusticana (Verdi) L. 2.50

Pri la devoj de l' homoj (Pellico) L. 3

La pesto en Milano dum 1630 (Manzoni) L. 2

Anekdotoj pri Dante L. 0.50

Vivo de S. Francisko el Assisi (Carolfi) L. 5

Tra la Franciskana Urbo Assisi L. 2

Itala Esperanta Revuo (monataj) jarab. L. 10

Eldonejo: A. PAOLET

S. Vito al Tagliamento — (Italio).

Membroj en pli ol 40 landoj Unu klubo por interŝanĝi poŝtmarkojn, poŝtkartojn, papieronon ktp. kaj por korespondado kun la tuta mondo. Postulu prospekton. Fr. Jacobi, Bahnhofstrasse 39, Coblenz - Germanujo

Anoncetoj.

Anoncetoj pri esperantista vivo (naskiĝo, fianĉigo, edziĝo, morto, okazonceloj, gravaj esp. kunvenoj, festoj k. s.) se n-paĝe. Aliaj anoncoj, nur akceptitaj por minimume du sinsekvaj enpresoj, koston po du enpresoj kaj 20 vortoj (krom unu adreso) la prezon de ok ET-numeroj kontraŭ antaŭa pago. Abonantoj, ĉe kiuj ni povas depreni la pagon de la abonkonto, ĝuas por propra anoncoj preferan prezon de kvin ET-numeroj. Germanoj pagas 2.— mk., prefera prezo por postabonantoj 1.25 mk. Anoncetoj devas alveni 12 tagojn antaŭ publikigo.

EDZIĜO. S-o Giuseppe Barbieri, esperantisto el Voghera (Italio) edziĝis kun f-lino Ernestino Zorzella. [1]

ELDONEJO "ESPERANTISTA VOĈO". Jaslo (Polujo) posedanto: Salo Grenkamp-Kornfeld, liveras ĉiujn esperantajn librojn ktp. Postulu prezaron. [4]

RUSA ESPERANTISTINO serĉas someres-tadejon, tri semajnojn dum aŭgusto. Oni proponu al f-lino Maria Smotritzki, Berlin-Charlottenburg, Stutigarter Platz 5. (Germanujo). [2]

KORESPONDVESPERON la 15 junio k. l. aranĝas Boris-lava grupo laŭ temo "Internacia Humoro kaj Satiro". Ĉiuj partoprenantoj ricevos certe respondon per vesperaj humoraj kaj satiraj, alsenditaj de allandaj partoprenantoj. Ekstereŭropanojn ankaŭ ni tre invitas. Adreso: S-o R. Wulczek, "Kasa Chroych", Boryslav, Polujo. [2]

KIU PRUNTO al pola studento 80—100 dolarojn por plibonigo de la monĝito (dentoj). Li redonus tiun ĉi sumon dum unu jaro. Ofertojn bonvolu sendi al St. Kowalewski, p. a. Vizekonsulato der Republik Polen, Schneidemühl, Germanujo. [2]

ATENTU! Mi scigas la tutmondan gesamideanon, ke pro diversaj kialoj mi estas devigata ĉesigi la korespondadon. A. Maudič, Fiume. [2]

ATENTU, SAMIDEANO! Ni aranĝos letervesperon la 30 junio por havigi al ni korespondantojn. Bonvolu adresi al Esperanto-Fako de Tulestonia Gejunularo Unuigo, Piekki tñ 69, Tallinn, Estonio. [2]

BRITA ESPERANTO ASOCIO, 17 Hart Street, London W. C. 1, deziras aceti n-on 2 de "Esperanto Triumfonta", ankaŭ "British Esperantist" (Volumo II, 1906). [2]

NUR 5 sv. fk. ENSENDU kaj vi ricevos 120 diversajn polajn poŝtmarkojn. Ni forsendas ankaŭ pm, elektojn post ricevo de plej bona referenco aŭ mondepono. Eldonejo "Esperantista Voĉo", Jaslo (Polujo). [4]

SAMIDEANOJ TUTMONDAJ! Helpu al mi aranĝi en nia loko esperantan ekspozicion por ke ni pruvu al urbanoj, ke nia lingvo vere estas tutmonda. Sendu libretojn, gazeton PM, PK, en uite esperantaĵojn — precipe vi ekstereŭropanoj laŭ adreso Rudolf Sigl, Daruvar, Jugoslavio. [2]

SAMIDEANOJ HELPU! Por sukcesigi esperantan propagandon inter lernantoj de arbara lernejo, ĉiuj helpemaj samideanoj estas petataj sendi malneceajn por ili apartajn numerojn de esperantaj gazetoj, ĵurnaloj ktp. al Lesnaja Skola, legejo de lernantoj, Toĵima de Vologda gub., Rusujo. [1]

MI PETAS pardonon de miaj estimataj korespondantoj el ĉiuj landoj, se mi trome prokrastos respondojn al iliaj leteroj, ĉar mi provizore translokiĝis. Post daŭr tri monatoj revenante hejmen mi sendos. Mia nova adreso: E. F. Rebrük, Barfrouche, Persujo. [1]

VERDAJ STELOJ en bela Oĉchi-pantaŭo, manlaboro, en silko, kotono, lano, 5 ĝis 10 cm. grandaj, belaj ornamantoj por subleteroj, flagoj ktp. aŭ aliaj Oĉchi-pantaŭoj! Geinteresuloj skribu al f-lino Hildegard Nickel, Potsdam, Blücherplatz 2, Germanujo. [1]

55-JARA FRAŬLO, de kelka tempo senlabora, serĉas ĉian laboron. Preferas okupojn kiel magazenisto, kun ĉevaloj kiel faktristo, kapablas ankaŭ labori en litografio. Parolas germane kaj esperante. Bonvolu skribi al H. Winkler, Tummelplatz 10, Linz, Aŭstrio. [1]

Korespondoj kaj Interŝanĝo.

F-lino Jeanne Mörrrens, Happerstrat 5, Antwerpen (Belgujo), deziras korespondi pri la ĉiutaga vivo. Nepre respondas. [2]

S-o Lejour, Dambruggestraat 259, Antwerpen (Belgujo), deziras korespondi per leteroj kaj il. PK. [2]

Belga samideano en Ameriko deziras korespondi. S-o John Huybers, p. a. T. W. Turner, River Road, Newportnews, Virginia (U. S. A.) [2]

S-o Georges Vermeulen, Quai des Etats Unis 6, Liège (Belgujo) deziras korespondi per il. PK kun la tuta mondo. [2]

S-ino Leonie Van de Meerssche, Veerstraat 42, Dendermonde (Belgujo), deziras korespondi per il. PK kun la tuta mondo. [2]

S-o Antoine De Wilder, komercisto, Zele (Belgujo), deziras korespondi per il. PK kaj leteroj; ankaŭ interŝanĝi PM kun gesamideanoj el ĉiuj landoj. [2]

S-o Joseph Claes, instruisto-studento, Ledegangstr. 8 Gent (Belgujo), deziras korespondi kun la tuta mondo per PK PM kaj leteroj en Esperanto aŭ franca lingvo. [2]

S-o Fišman, Republikstr. 78, en Panevezys (Litovio), deziras interŝanĝi PM kun Balkano, Rusujo kaj Ekstereŭropo. [2]

S-o José Salom Nadal, intervilaga vojo de la montaro 82 (Malborea), Sia de na Tesa, Hispanujo, deziras korespondi nur kun f-lino de la tuta mondo per il. PK (bfl.), precipe el Japanujo, Siberio, Hindujo, Ĥinujo kaj Palestino. [2]

Mi deziras interŝanĝi PM kun la tuta mondo. Aleksander Pakkane, Jõhvi, Narva tñ 55, Estonio. [2]

S-o Ludoviko Rack, Erzebet-u. 58, Ujpest, Hungarujo, volas korespondi kun gekamaradoj el tuta mondo. Interŝanĝas PK, PM kaj papieronon. [2]

Gesamideanoj ĉiulandaj, atentu! Juna 22-jara fraŭlo, popol-instruisto, deziras korespondi pri pedagogio, psihologio, filozofio, religio kaj popolivo kaj proponas interŝanĝon per propraj esperantaj versajtoj kun poetoj de la mondo. Adreso: A. Novokreŝenov por Serafim Davidov, Jelezodorojnaja ul. 51, Serdobsko, Saratova gub., Rusujo. [2]

Mi deziras interŝanĝon de PM kun la tuta mondo. Mi korespondas per angia kaj franca lingvo. Sendu al s-o A. Osterloh, Magdeburg-Wst., Ebendorferstr. 18, Germanujo. [2]

Du fratinoj Mikaelo Morozov kaj Georgo Morozov, Kandalakŝa de Arhangelska gub., barak 21 b, kv. 2, Nord-Rusujo, por perfektigi en Esperanto-lingvo, deziras korespondi kaj interŝanĝi per PK il. kaj L. pri iu ajn temo kun gesamideanoj de la tuta mondo. Tuj respondos. [1]

S-ino Irma Pick, Liechtensteinstr. 25, Wien 9 Bez., Aŭstrio, deziras korespondi per il. PK kun ĉiuj landoj. [2]

S-o Semerad Bohuslav, instruisto, Ĥlumoc n. C., Ĥeĥoslovakio, interŝanĝas PM kun ĉiuj landoj. [1]

Atentu! Tri veraj esperantistoj deziras interŝanĝi per il. PK (bfl.) kaj L. nur kun sinceraj gesamideanoj. Adresoj: H. Siebenkdeas, Ludwigstr. 45, R. Ulrich, Gutenbergsstr. 2, K. Waldmann, Ludwigauerstr. 62, ĉiuj en Selb (Bavarujo), Germ. Ni ĉiam respondos al ĉiuj. [1]

Tri italaj fraŭloj deziras korespondi letere aŭ PK kun samideanoj tutmondaj, precipe kun fraŭlinoj, pri diversaj temoj. Respondon ni grantas aimonaŭ unufojan. Kaporalo Indriki Grisli, Kaporalo Andreo Stikis 3, Tukuma b-na en Vec-Gulbene, Latvio. [1]

S-ano Davv Patt, ul. Cegielianna 71, Lodz, Polujo, deziras korespondi seriozo pri tekstaj aferoj precipe interŝanĝas diversaj teks-, brod- kaj ardesegnaĵojn kaj koncernajn ĵurnalojn. [1]

Kiu sendas al mi 100 aŭ pli PM de sia lando ricevos saman kvanton da germanaj PM Walter Bartels, Braunschweig, Lessingplatz 5, Germanujo. [1]

F-lino Tani Brejchova, Kral Vinohrady, Korunni tr. 54, Ĥeĥosl., deziras korespondi kun la tuta mondo kaj interŝanĝi PM, L, PK kaj diversajn objektojn. [1]

S-o Carl Krüger, poŝtoficisto, Sietin, Friedrich-Karlstr. 17, Germ., deziras interŝanĝi PM kun ĉiuj landoj. Mi povas doni "Deutsches Reich" (1906—24) kaj Danzig al monon. Ne sendas unue. [1]

S-o Johano Danca, 8 Sztyl str. 9.1 16., Budapeŝt, Hung., deziras korespondi kun la tuta mondo pri fakorganaj kaj sov.-part-organaj. Nur tuj skribu, kiuj partoprenas je laborista movado aŭ bone konas ĝin. [1]

Mi deziras korespondadi kun ĉiuj landoj nur per Esperanto. Mi antaŭ nelonge alveturis el Buĥara (Turkestano). Volonte sendas vojaĝ-impresojn. Adreso: Rusujo, Siberio, Altaĵo, St.-Barda, Bijskago uzda, por s-o Nury Hazym-Bek. [1]

Mi deziras korespondi kun fraŭlinoj ĉiulandaj kaj ekstereŭropaj samideanoj (mi estas 25-jara komercisto). Ĥeĥoslovakio, Deskesan. Eduard Friedmann, Dolna okr. 40, Prešov, Ĥeĥosl. [1]

Mi deziras korespondadi kun fraŭlinoj ĉiulandaj. Z. Rónai, drogisto, Corso-drogerio, Prešov, Ĥeĥosl. [1]

S-o Laviĉka Ferdo deziras korespondi kaj interŝanĝi il. PK (bfl.) kaj PM. Respondas al ĉi akurate. Adreso: Daruvar en Jugoslavio. [1]

Karl Mätzl, Hainburg, Aŭstrio, deziras korespondi kun franca samideano, kiu sendas franclingvajn librojn kaj revuojn (kontraŭ pago). [1]